# Informilo

02 DEC. 1981

LEGANTO, BONVOLE ATENTU !

Plenigante vian (novan) FEL-aliĝilon, bone pripensu, ke por profiti la plej grandan rabaton en la Universala - Kongres - kotizo, V I NEPRE ABONU ESPERANTO kaj JARLIBRO de U E A.

Monata revuo de F L A N D R A E S P E R A N T O - L I G O
Maandblad van V L A A M S E E S P E R A N T O - B O N D

Jarkolekto
Jaargang N° 1 nov. 1981

Verantwoordelijke
Respondecas Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14, B-2510 MORTSEL

**I N F O R M I L O**

Kadrogazeto. Aperas ĉiu-monate, krom en julio kaj aŭgusto.

Abono : BF 100,- jare

"INFORMILO" estas kontaktilo/ diskutilo inter la estraro kaj la membraro de FEL. Ĉiu povas partopreni en ĝi per personaj kontribuaĵoj. Tiuj ĉi komprenеble restu sub la respondeco de la kontribuantoj.

Tekstoj atingu la redakcion antaŭ la 10-a de la monato.

---

**F E L - Ŝ P A R K O N T O**

FIKSDATAJ MONDEPONOJ

Minimumaj sumoj : BF 5.000,-

Minimuma periodo : 2 jaroj

- ĉu per pago en unu el la kontoj :
  402-7069801-50
  000-0265338-43
  menciante : DEPONO
- ĉu rekte al la Direktoro de ESPERANTO-CENTRO ANTVERPENO

---

LIBRO-SERVO **S O N O R I L O**
Doornstraat 22
2610 WILRIJK
Direktoro : Monique VEREECKEN
Telefono : 031/27 24 05
Kontoj : 000-0152140-44
320-0342460-23

FLANDRA ESPERANTO-LIGO
Arsenaalstraat 5
2000 ANTWERPEN
Telefono : 031/16 05 05
Direktoro : Paul PEERAERTS

---

FEL-estraro

Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A
2180 KALMTHOUT
031/66 62 66
prezidanto, estrarano pri informado, planado, agado

Roger DE SCHEPPER, Doornstraat 22
2610 WILRIJK
031/27 24 05
vic-prezidanto, estrarano pri financplanado

Jules VERSTRAETEN, St Bernardsestwg 1078
2710 HOBOKEN
031/27 66 43
estrarano pri financoj

Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14
2510 MORTSEL
031/49 50 06
ĝenerala sekretario, estrarano pri administrado kaj edukado

Fernand ROOSE, St Klaradreef 59
8000 BRUGGE
050/33 19 81
estrarano pri kulturo, respondeculo por Okcident Flandrujo.

René BUDTS, Pr. Rooseveltlaan 168/9
9000 GENT
091/ 23 53 48
respondeculo por Orient Flandrujo

Marie Thérèse HENQUINEZ, Lipsestraat 166
2991 TILDONK
016/23 61 90
respondeculo por Brabanto.

Guido SCHROEYERS, Helzoldstraat 113
3538 HELCHTEREN
011/53 64 10
respondeculo por Limburgo

Kristin TYTGAT, St Hathebrandstraat 8
2510 MORTSEL
031/49 50 24
Kontaktoj kun la junularo (FLEJA)



L.S.,

Jen ni denove kun INFORMILO, ni esperas iom pli varia.

Ĉu ĝi tiel plaĉos, ni ja vidos en la abonoj.

Ni nin demandas ĉu INFORMILO eble jam estas sufiĉe konata de nia membraro, ĉu tiuj personoj kiuj ĝis nun ĝin ricevis, jam pensis pri .. montri ĝin al la aliaj membroj de sia grupo.

Normale ili devus, ĉar estante la oficialaj reprezentantoj de la grupoj ĉe FEL-estraro, estas ja ilia devo informi la aliajn.

Restas la demando, kiom dà reprezentantoj = respondeculoj de la grupoj, bone plenumas tiun taskon. De tio ja dependas la tuta movado.

Do, ĉu ni povas speciale atentigi pri la necesa kunlaboro kaj peti al ĉiu, kiu ricevas INFORMILO-n, iom reklami pri ĝi, por ke sin anoncu kiel eble plej da abonontoj.

Cetere, nur tiel ĝi povas esti la ligilo kiun esperas nia prezidanto.

Ĉu vi miras kial ni metis INFORMILO-n inter la abonendaj revuoj ?

Estas du kialoj : atingi pli vastan publikon kaj, kompreneble, kovri la kostojn sufiĉe altajn.

Kompreneble, se evidentiĝos ke ne estas sufiĉe da intereso, ni ne perdos pli longe nian tempon..

Per tio ni volas fakte diri, ke ni volonte foroferas nian liberan tempon ( kaj foje eĉ nian monon ) por ESPERANTO, sed ne"por la belaj okuloj de la princo", ne se tio al nenio/neniu servas.

---

## NI HAVIS OKAZON ĈEESTI ...

## LA INTERNACIA JUNULARA SEMAJNFINO EN LICHTAART (30 10 - 01 11 1981)

Ni profitis la okazon okazigi nian kern-estrar kunsidon (financa/administra) kadre de la Internacia Junulara Semajnfino de Lichtaart.

Tuj nin trafis la etoso. Jen vera "kongres"-etoso. Ja vere ! Gaja, vigla interkirlanta homamaso, amike-agrable interbabilanta, amuziĝanta.

Varma amikeco venis al ni renkonte, familiareca salutado, bonvolema akcepto, juneca sincero.

Persone mi tuj entuziasmiĝis. Jen kiel en vero okazu kongreso. Por ĉiu io : kunsidemuloj kunsidu ; amuziĝemuloj amuziĝu ; babilemuloj babilu, promenem-

uloj promenadu, ĉiu laŭplaĉe.

Ili, la junuloj, almenaŭ ankoraŭ sukcesas kunvenigi kelkajn centojn da homoj ! Komparu kun la pasinta "Federacia kongreso" al kiu venis apenaŭ 30-o da personoj, kiuj eĉ ne havis la okazon amike interbabili !

Dankon, junuloj, pro la leciono. Dankon pro la enkuraĝigo de niaj jam "griziĝantaj" ni-oj.

La aranĝon ĉeestis ± 120 partoprenantoj el Belgio, Francio, Britio, Italio, Greklando, Nederlando, Nov-Zelando, Brazilio, Japanio, Germanio kaj Kanado.

Sabate vizitis la "kongreson" 30-o da personoj, el kiuj Ges-roj Maertens, FEL-estraro kaj diversaj kursanoj el Antverpeno, Dendermonde, Leuven kaj Mortsel.

-------------

## Ĝ E N E R A L E

NEKROLOGO.

Je 12 10 1981, post longa malsano, forpasis Theo NISSEN el Kalmthout, edzo de la de ĉiuj Antverpenanoj konata "Panjo Ida".

Al nia bona amikino kaj kunfamilianoj niajn plej sincerajn kondolencojn.

## F E L

JARĈEFKUNVENO 1982

Nia prezidanto preferus, ke samkiel la pasinta, la venonta jarĉefkunveno denove okazu en "KASTEEL VAN HAM" en Steenokkerzeel.

Vi scias, ke tiu kastelo, situanta en belega natur-regiono, estas senpage disponigata de la Ministerio pri Nederlanda Kulturo al kulturaj organizoj el Flandrio.

S-ro Symoens opinias, ke ni ne povas preterlasi kian ajn eblecon por pruvi nian ekziston, nek okazon emfazi nian realecon kunvenante en altnivela, kultura kaj prestiĝa historia konstruaĵo.

Efektive, ĉiu kiu sin respektas, certe ŝatas kunsidi en prestiĝa kaj respekto-peta ejo.

Tamen, ĉar FEL laŭstatute estas "demokrata" organizaĵo, ni devas sekvi la volon de la mebraro, almenaŭ de la plimulto.



Tial, se estas personoj kiuj kontraŭstaras la intencon de la prezidanto, ili estas insiste petataj tion sciigi al ni senprokraste, proponante alternan solvon kaj, kompreneble, specifante siajn argumentojn.

Krom kontraŭproponoj, ni konsideros ĉiun aprobanta la intencon de la prezidanto, laŭ la regulo ; "Kiu silentas, konsentas."

Anticipan dankon pro via peno.

-------------

PRI LA NOVA ALIĜILO

Kun la novembra numero de ESPERANTO PANORAMA, ĉiu FEL-ano ( FEL-familian-aro) ricevis oranĝkoloran aliĝilon kun la peto transdoni ĝin plenigita al la grupa kasisto aŭ resendi ĝin rekte al FEL- Esperanto- Centro en Antverpeno.

Kontraŭe al tio, kion ni metis en nia speciala numero de INFORMILO-oktobro 1981, la kasistoj do N E pagu la totalon de la aliĝiloj, sed N U R S E N D U la aliĝilojn al FEL kaj A T E N D U ĝis kiam FEL-E°-CENTRO sendos al ili la liston de la membroj kaj sciigos kiom ili devos pagi aŭ ricevi, post kalkulado de la ricevotaj kotiz-partoj.

Ni pardonpetas pro la erara informo, pri kiu fakte kulpas unue la urĝeco per kiu ni devis informi vin kaj kompreneble ia miskompreno pro tio, ke via "servanto" ne estas librotenisto.

-------------

KADRO-KURSOJ

Restas ankoraŭ du studotagoj el la serio, kiun ni startis ĉi jare : 28 11 (Komunikado) kaj 05 12 1981 ( Kunven- kaj Debatteknikoj).

Ĉu ni limigu nin al tio ?

Ne, kompreneble ne. Tio signifus perditajn tempon kaj fortostreĉon.

La tuta entrepreno celis/-as plibonigi nian movadan agadon fare de kompetentaj kadromembroj. FEL-estraro cetere jam decidis ne plu akcepti aŭ respondeci agadon de personoj, kiuj ne sekvis la kursojn.

Nun, por orientigi nin kaj nian laboron, ni intencas organizi du seminariojn ĉi jare por ĉiuj kursanoj kaj kursgvidantoj. La unua je sabato 23 01 1982, por ebligi al ĉiu/ formuligi siajn rimarkojn, sugestojn (kursanoj) kaj respondojn (kursgvidintoj). La dua en majo/junio por interŝanĝi spertojn ktp kaj por

ebligi fari konkretan raporton al la UEA-Komisiono pri edukado, okaze de la UK.

Krome, je sabato 06 03 1982 okazos studotago pri administrado/financado gvidota de S-ro G. Maertens kaj al kiu estas invitataj ĉiuj grup-respondeculoj.

Kiel jam dirite, la celo de la entrepreno estas krei kadromembrojn, kiuj kapablas prizorgi (almenaŭ) la lokajn adminsitrajn taskojn, por ke estonte nia salajrata personaro ne plu devas perdi sian tempon por klarigi simplajn problemojn, kiel ekzemple plenigi aliĝilojn aŭ kiel renovigi kotizojn ktp.

-----------

## ANTVERPENO

### L A V E R D A S T E L O

La Verdstelanoj bonvole atentu !!

En ESPERANTO NOVAĴOJ vi legis, ke LVS organizos Kristnaskofeston por la infanoj je dimanĉo 13-a de decembro. Tio N E E S T A S K O R E K T A !!
La festo okazos la 2 0 -an de decembro.

Bonvolu averti aliajn Verdstelanojn kiuj eble ne ricevas INFORMILO-n.

Nome de LVS-estraro, elkoran dankon.

----------

### BONEGA IDEO !

Dum la klubkunveno de vendredo 6-a de novembro, la LVS-prezidanto havis la bonegan ideon plenigi la FEL-aliĝilojn de la membroj kune, donante la necesajn klarigojn kaj helpon.

Dankon Ivo, pro via bona ekzemplo !

----------

### SILVESTER-VESPERO.

LA VERDA STELO donas alian bonan ekzemplon.

Konsiderinte, ke por homoj vivantaj solaj, la soleco estas plej prema ĝuste dum festotagoj kiel Novjaro aŭ la jarŝanĝiĝaj festovesperoj,
LVS decidis speciale atenti tiujn personojn kaj organizos "Silvester-vesperon"



# P R O T O K O L O J

KERN-ESTRAR-KUNSIDO FINANCA/ADMINISTRA OKAZE DE LA INTERNACIA JUNULARA SEMAJNFINO EN LICHTAART, SABATON 31-AN DE OKTOBRO 1981.

Ĉeestas : Edward SYMOENS, Paûl PEERAERTS, Roger DE SCHEPPER, Jules VERSTRAETEN, Jan BOVENDEERD.

Prezidas : E. Symoens

Protokolas : J. Bovendeerd.

T A G O R D O :

Kontrakto FLANDRA ESPERANTO-LIGO / UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO / GRAFIKA CENTRO ANTVERPENO. ( FEL/UEA/GCA)

Post antaûa diskuto en KFA (Komisiono pri Financoj kaj Administrado) de UEA, PP redaktis kontraktprojekton rilate al la divido de kostoj inter FEL kaj UEA/GCA.

Antaûa rimarko : rilate al la luo de la Esperanto-domo, Frankrijklei, LA VERDA STELO luos rekte de Institucio HODLER, dum FEL partoprenos en la kostoj laû-kontrakte.
Vid'al vide FEL, LVS faras nenion specialan. FEL estas konsiderata kiel ĉiu alia Esperanto-organizaĵo/klubo, sen ia ajn alia avantaĝo.

FEL bezonas la samajn avantaĝojn, kiujn ĝi ĝis nun havis en Arsenaalstrato.

KONTRAKTPROJEKTO.

1.1.1. Ĉu FEL povos pagi; ĉu ĝi havas la financajn eblecojn ?

1.1.1.1. Por havi solidan bazon por diskuti, ni antaûe disponu pri konkreta, detala labordivido en Esperanto-Centro.
Kiu faras kion ?

PP 1.1.1.2. PP okupiĝos pri la registrado de la diversaj okupaĵoj dum proksimume 2 jaroj.

1.1.1.3. En la kontrakto aldone enmetiĝos klaûzon pri revizi-rajto de FEL post la periodo sub 1.1.1.2.

PP 1.1.2. Por permesi al la FEL-estraranoj esti kiel eble plej bone informita), PP ellaboros labor-superrigardon = iaspecan organigramon de Esperanto-Centro.

1.2. RIMEDOJ.

1.2.1. Subvencioj

1.2.1.1. Por ekzakte koni la proporcion de la EN- kaj EL-spezoj FEL/GCA, RDS faris tre detalan prikalkuladon super 2 jaroj. Surbaze de ties rezultato, li proponas rekalkuli ĉiujare de-nove la ekzaktan situacion.

1.2.1.2. La kontrakt-propono tekstu do iasence tiel, ke FEL ĉiujare faros proponon al UEA pri la subvenci-divido.

1.2.2. Pri la "donacoj sen definita celo" decidu FEL-estraro.

PP 1.3. PP adaptos sian kontraktproponon kaj havigos al la ceteraj membroj de la kerno Financa/Administra kopion, por permesi plian diskutadon vid'al vide UEA.

2. <u>Aldonaj punktoj</u> :

2.1. <u>Nova "aliĝilo" de FEL</u>

2.1.1.1. Decidiĝis, ke la grupoj ricevu po F. 50 el la kotizoj. Kio do pri FLEJA?

2.1.1.2. Ĉar FLEJA ĉiukaze devus pagi tiujn F 50 al siaj grpuoj, same bone pagi al FLEJA F. 50 kaj al la grupoj same F. 50.

2.1.2. La subtenkotizoj kompreneble iru komplete ĉu al FEL ĉu al FLEJA.

2.1.3. <u>Ĉiuj abonoj iros tra SONORILO</u>. Makleraĵo ne estos, ĉar tiu fakte estas tiel malalta, ke ĝi eĉ ne komplete kovras la kostojn.
Se FEL proponas peradon, estas ĉefe por plifaciligi , tiel la taskon de la grupaj kasistoj, kiel la situacion de la membroj, kiuj estonte devos memorteni nur unu-nuran adreson por ĉio,kio koncernas Esperanton en Flandrujo.

2.1.4.1. Pri la pagmaniero, la proponon faritan en INFORMILO-speciala numero, praktike ne taŭgas.

2.1.4.1. La grupaj kasistoj estas petataj <u>sendi nur la aliĝilojn al la E°-Centro kaj atendi</u> ĉu la ĝiron de FEL, ĉu la fakturon pri tio, kion ili devas ankoraŭ pagi.
La aferoj ja restu simplaj.

2.2. <u>Kiu ricevas INFORMILON senpage</u> ?

2.2.1. Ĝis nun ĉiuj personoj kiuj troviĝas en la Organigramo.

2.2.2. Tio tamen estas tro alta ŝarĝo.

2.2.3. Tial JB proponas jenajn ricevontojn :
- la estraranoj
- la direktoro de Esperanto-Centro
- FLEJA-estraranoj
- ĉiu grupo po unu numero



- la kunlaborantaj asocioj (BEFA, FABE, IKUE, Laborista grupo ANTAŬEN)
- la prezidanto kaj ĝenerala sekretario de BEF
- la prezidanto de APE
- la ĉefdelegito de UEA
- la estraranoj de UEA.

2.2.4. Ĉiu alia persono, kiu volas sekvi la estraran laboron kaj la movadajn aktivecojn, estas petata aboni ĝin. La prezo ja ne estas alta.

2.3.1. Kiel jam anoncite en antaŭa numero de INFROMILO, en Oostende ekestis nova Esperanto-kerno.

2.3.2. La prezidanto demandas ĉu eblos disponigi al ĝia iniciantinto iom da propagand-materialo por starti la aferon.

2.3.3. Laŭ PP la grupoj pagas sian propagand-materialon.

2.3.4. Ĉar fakte ankoraŭ ne ekzistas grupo, ĉu ni povas postuli pagon de individuo, kiu jam bonvolas labori ?

PP 2.3.5. Kompreneble ne. Tial PP havigos kvanton da propagandmaterialo al S-ro D'Hulster.

Fino de la kunsido : 16.30 h.

JB

---

ESTRARKUNSIDO DE SABATO 14 11 1981 EN ANTVERPENO

Ĉeestas : Edward SYMOENS, Roger DE SCHEPPER, Jules VERSTRAETEN, Paul PEERAERTS, Jan BOVENDEERD.
Dum la posttagmeza parto ĉeestas ankaŭ F-ino M.Th. HENQUINEZ.

Petis senkulpigon : FLEJA, Fernand ROOSE, Guido SCHROEYERS

Prezidas : E. Symoens

Protokolas : P. Peeraerts kaj J. Bovendeerd.

<u>T A G O R D O</u>

1. La protokoloj pri la estraraj kunsidoj de 22 08, 12 09 kaj 31 10 1981 estas aprobitaj.

2. Raportado de la estraranoj :

2.1. Administrado : nenio speciala

2.2. Edukado : nenio speciala

2.3. FINANCOJ

2.3.1.1. JV timas, ke tro da membroj ne reabonos al ESPERANTO de UEA, pro kio ni eble perdos la profiton el la kolektivaj abonoj.

2.3.1.2. RDS proponas, ke pere de INFORMILO la membraro estu atentigita pri tio, ke nur abonante ESPERANTO-n eblos profiti de la plej malaltaj kongreskotizoj.

2.3.1.3. PP proponas post unu monato statistiki kiom da personoj membriĝis kun kaj kiom sen la revuo ESPERANTO.
Aprobite.

2.3.2. LIBROTENADO - ADMINISTRADO

2.3.2.1.1. Rilate al la nova aliĝilo restas kelkaj rimarkoj.

2.3.2.1.2. La kasisto de LA ERIKEJO el Kalmthout proponas enmeti ankaŭ en la kotizoj : SUBTENKOTIZO AL MIA LOKA GRUPO"

2.3.2.1.3. RDS opinias, ke ankaŭ la profesio devus esti menciita. Samkiel la aĝo ja ankaŭ gravas la profesio, ne nur por statistikaj kialoj sed certe ankaŭ por praktikaj celoj. Supozu ke iu serĉas ion aŭ volas fari ion el profesia vidpunkto.

2.3.3. ESPERANTO-CENTRO

2.3.3.1. Nun pluraj personoj havas ŝlosilon de E°-Centro en Arsenaalstrato.

2.3.3.2. PP proponas,por la nova adreso, limigi la ŝlosilkvanton je absoluta minimumo.

2.3.3.3. Ĉiu konsentas.

2.3.3.4. JB proponas fiksi iun tagon de la semajno, je kiu la estraranoj aŭ eventualaj interesitoj povos viziti la Centron. Por aliaj aferoj aŭ vizitintencoj oni kontaktiĝu kun la respondeculo de la Centro.

PP 2.3.3.4. PP intencas ellabori detalan planon rilate al sekura funkciado de la ferm- kaj malfermsistemo.

2.4. INFORMADO - PLANADO - AGADO

2.4.1. ES Raportas, ke en Oostende la afero progresas. Kunvenis jam 12-o da personoj.

PP 2.4.2. Li petas al PP sendi pli da informmateriało.

3. KIEL KOMERCIGI FEL

3.1.1. FEL havas pli da elspezoj ol da enspezoj, kaj do devas trovi rimedon por tio.

3.1.2.1. Ĉu GCA havas sukceson rilate al preslaboroj por eksterstarantoj.

3.1.2.2. GCA estante UEA-afero, la gajnoj el tiuj laboroj ne revenas al FEL. Cetere, FEL estante ASPC,ne povus tro gajni el tio.

3.1.2.3. Tamen GCA donas maklerajon al alportantoj de laboro, do ankaŭ al FEL.



3.1.3.1. Komercigo, do, enspezeblecoj troviĝu ekzemple en la ELDONADO DE LIBROJ.

3.1.3.2. Eventuale ankaŭ la abonoj povus alporti enspezojn el la maklerajoj.

3.1.3.3. FEL nun faras la administran laboron, dum la maklerajoj iras al SONORILO.

3.1.3.4. Ĉu intervenigi SONORILO-n en la kostoj ?

3.1.3.5. PP proponas iom atendi la evoluon de la abonado.

4. ELDONO DE LA VERKETO DE R. DE ROOVER

4.1.1. Jam antaŭe decidiĝis, ke FEL eldonos kaj SONORILO disvendos ĝin. (vd punkton 3 de la protokolo pri la administrantara kunsido de 03 10 81)

4.1.2. La teksto jam troviĝas ĉe S-ro Chris Declerck por fina pretigo.

4.1.3. JB insistos pri urĝa finpreparo.

5. MONRIMEDOJ

5.1. ES opinias, ke ni sekvu kaj profitu la politikan renoviĝon de Flandrio.

5.1.2. El la diskutado evidentiĝas, ke la unua paŝo estu krei "ELDON-KOMISIONON", kiu havos kiel taskojn :

a) kunigi ĉion kiu rilatas al Esperanto-verkado en Flandrio :
- tradukoj
- propraj verkoj

b) elekti eldonindajn verkojn

c) fari prioritatojn rilate al la eldonado

5.1.3.1.1. Samtempe kreiĝu (jam kreiĝis) speciala eldonkonto por kovri la kostojn.

5.1.3.1.2. Ĝis nun pagadas 2 personoj.

5.1.3.2. Se estus 50 personoj pretaj ĝir(ig)i po F. 100 monate, ni kolektus F. 60.000,- jare.

5.1.3.3. Tiu sumo sufiĉus por eldoni almenaŭ unu verkon jare.

5.1.3.4. Ni faru leterprojekton por reklami la aferon por la venonta kunsido.

5.1.4.1. Kadre de la ELDONKOMISIONO kreiĝu ankaŭ "TRADUK-SERVO"

5.1.4.2.1. Por vidi pri kia "homa materialo" ni disponas en tiu rilato, JB proponas fari traduk-konkurson pere de ESPERANTO PANORAMA.

PP 5.1.4.2.2. PP priekzamenos la eblecon por tio.

JB 5.1.5. La sekretario estas komisiita kontakti C. Declerck por klopodi konvinki lin akcepti respondecon pri la EDON/TRADUK-KOMISIONO.
Por helpi al li, JB sugestos kelkajn nomojn (ekz. R. de Roover, F. Roose, Petro Desmedt)

PP 5.1.6. Por komenci PP, pere de ESPERANTO PANORAMA, petos al ĉiuj, kiuj iam ion verkis/tradukis en Esperanto, ensendi tion por esti submetota al la ELDONKOMISIONO, kiu siavice konsilos FEL/GCA pri ilia eldon-indeco kaj -sinsekvo.

5.1.7. La komisiono estos petita fari planon kaj komenci per tradukoj de valoraj Flandraj verkoj.

5.1.8.1. Post kiam la plano estos preta, ni kontaktiĝu kun :
- societoj/fondaĵoj ktp por helpi financi la eldonadon de difinita verko.
- la ministerio, kiu jam antaŭe montris intereson rilate al eldono de verkoj el nia literaturo (ekz. Kristnaska Triptiko - F. Timmermans)

5.2. FIKSDATAJ MONDEPONOJ
5.2.1. Ĝis nun envenis unu depono de F 5000
5.2.2. La reklamilo nun estas preta kaj dissendota.

6. KORESPONDAJ KURSOJ
6.1.1. PP alskribis 30-onda personoj por peti ilian kunlaboron por korekti la taskojn.
6.1.2. Respondis 6-o el ili, ĉiuj principe jese.
6.2.1. La prezo estas fiksita je F. 1.000,- el kiuj F. 500,- por la korektonto.
PP 6.2.2. PP sendos leteron al la respondintoj por danki ilin kaj por pli detale klarigi la celatan labormanieron.
6.3. Por la "lanĉado" de la korespondaj kursoj, estos verkita artikolo kadre de la kadrokursoj.

7. EKZAMENOJ.
7.1.1. UEA-komisiono pri Edukado intencas organizi ekzamenojn kaj starigi ekzamenkomisionon.
7.1.2. JB, membro de tiu komisono, faras al si zorgojn pri la organizado.
7.1.3.1. ES opinias, ke en lia agadplano estas i.a. la starigo de ekzamenkomisiono kiel unua paŝo al (ebla?) oficialigo de la E°-diplomo.
7.1.3.2. Tio kompreneble ne estos ebla antaŭ la UK, sed post ĝi,li tuj ekagos en tiun direkton.
7.2. La estraranoj opinias, ke la ekzamenoj, almenaŭ la elementa kaj mezgrada, estas afero de la landaj asocioj, dum UEA povus prizorgi la superajn.
JB 7.3. JB raportos en tiu senco al S-ro Ragnarsson, respondeculo de la UEA-komisiono.
8.1.1. JB en artikolprojekto por INFORMILO pledas por revizio de la statuto kaj regularo de interna ordo, rilate al la elektado de la prezidanto kaj la estraro.
Decidiĝas repritrakti la temon okaze de la venonta kunsido.
8.2. Rilate al certaj malfacilaĵoj kun la poŝto-servoj, PP petas aranĝi la aferon pere de publikigo en la Ŝtatgazeto de la nova adreso de la sidejo ekde 01 01 1982.

Fino : 16.15 h.



# F L E J A

ESTRARKUNSIDO DE 31 10 1981 EN HOGE RIELEN, LICHTAART.

Ĉeestas : Gerd JACQUES, Frank PLATTEAU, Kiki kaj Wim TYTGAT, Jean Pierre VANDENDAELE
Komenciĝo : 21.10 h.

T A G O R D O

A. IJK
Dum la ijk okazos Belga vespero, kiu povus ekzemple konsisti el budoj, tombolo kaj grupa prezentado. LKK kunordigos kaj FLEJA kunhelpos komunikante adresojn pri eblaj junaj kunlaborantoj.

B. LICHTAART.
Por havigi subvencion, Frank prizorgos ĝeneralan raporton kaj Anne kun Albert kompilos financan raporton. Kunlaborantoj al tiu ĉi kongreso,kiuj volas repagon de siaj benzinelspezoj, bonvole anoncu ŝin ĉe Gerd Jacques (Arsenaalstraat 5 2000 ANTVERPENO)

C. FLEJA
a) Interna regularo (propono) pritraktiĝos dum marta kunveno. Jen la teksto :
1. Membroj :
1.1. Membreco akiriĝas pere de simpla pago de la kotizo
1.2. La membrokategorioj de FLEJA estas :
- ordinara membro (JM)
- patrona membro (ne membro) (PM)
- asocia membro (AM)
- kursano (K)
1.3. Nur la personoj el la kategorioj JM, K havas voĉdonrajton en la ĝenerala asembleo.
1.4. Aliĝo de grupoj : ĉiu junulargrupo, kiu deziras aliĝi al FLEJA, petas tion skribe al la sekretario de FLEJA. La peto devas esti subskribita de 2 estraranoj de la petanta grupo. Al tiu peto estu aldonita kompleta listo de la estraro de la grupo.

2. Administrantaro :
2.1. La administrantaro estas elektata de la ĝenerala asembleo laŭ la principoj de art. 10 de la statuto.
2.2. Procedo :
Volontuloj kandidatiĝas okaze de la elekto de la nova administrantaro. La ĝenerala asembleo elektas ĉiun kandidaton aparte pere de manlevo. La gvidanto de la ĝenerala kunsido unue voĉdonas. Lia/ŝia voĉo decidas

en kazo de voĉegaleco.

3. Estraro.

3.1. La ĝenerala asembleo elektas la estraron el la administrantoj laŭ la principoj de art. 12 de la statuto.

3.2. Procedo :
Kandidatoj prezentas sin okaze de la sekreta elekto de la nova estraro. Tiu estraro estas elektita grupe. La protokolanto organizas duan sekretan elekton. Kiam li denove konstatas voĉegalecon, li organizas sekretan voĉdonadon pri la kandidatoj individue.

3.3. La administrantoj elektas la prezidanton el la elektitaj estraranoj. Procedo : vidu 2.2.

4. Voĉdonado dum estrarkunsidoj :
Ĉiuj decidoj estas alprenataj per simpla plimulto de la voĉoj, escepte en la laŭleĝe antaŭviditaj kazoj. Ĉe voĉegaleco, la voĉo de la prezidanto estas decidiga.

5. Ĝenerala kunsido - procedo :

5.1. Akcepto de la gvidanto kaj protokolanto de la kunsido. Kontrolo de membreco.

5.2. Akcepto de la tagordo.

5.3. Akcepto de la protokolo de la antaŭa ĝenerala kunsido.

5.4. Prezentado de la jarraportoj + akcepto.

5.5. Liberigo de la respondecoj de la estraro kaj al administrantaro.

5.6. Elekto de la nova administrantaro.

5.7. Elekto de la nova estraro.

5.8. Elekto de la prezidanto.

5.9. Diversaĵoj.

Propono de la komisiono pri interna regularo.
Antverpeno, 16-an de septembro 1981
Luc Potiau Wim Tytgat

b. Revizoro de financa situacio far Albert kaj Bob. Gerd aldonos financan raporton al ili.

c) La venontjara kongreso okazos denove en Lichtaart verŝajne en la samaj konstruaĵoj kiel nun, kiam ne estos deficito. Ĉar ĝi okazos por la kvina fojo, io speciala povus okazi.

d) Eldoniĝos T-ĉemizoj kaj "Sweatshirts" kun la katedralo de Antverpeno kaj la mencio ESPERANTO aŭ FLANDRUJO. SONORILO rajtos vendi niajn sakojn kiam ili vendos ankaŭ tiujn T-ĉemizojn kaj "Sweatshirts".
Jean Pierre VdD kontaktos letere SONORILO-n.

Fino : 22.00 h. JP VdD.



en la ESPERANTO-DOMO je 31 12 1981 ekde 20.00 h.
Tiu vespero estos okazo de amuza ĉeestado en kiu ĉefrolos la ĉeestantoj mem. Por kiel eble plej bone organizi ĝin, tiuj personoj kiuj intencas partopreni ĝin kaj kiuj disponas pri ia amuzaĵo, bonvole sin anoncu al JB por la organizado.

Partopreno kostos po BF 600,- ĉ i o i n k l u z i v e ! Por infanoj estos speciala prezo.

Partoprenontoj sin anoncu ĉe S-ino Monique VEREECKEN (edz. De Schepper) tel 031/27 24 05 a n t a ŭ 1 5 1 2 1 9 8 1.

-----------

BRUĜO - PACO KAJ JUSTECO

El Bruĝo oni anoncas kurson kiun partoprenas 15-o da lernantoj. Ĝi estas organizita de PACO KAJ JUSTECO kaj gvidata de S-ro Fernand ROOSE.

-----------

BRUSELO

Ankaŭ en Bruselo okazas kursoj, du eĉ, kiujn partoprenas 17-o da personoj. Por la progresiga kurso, S-ro E. Van Damme uzas la = jam mondfama - "Tinĉjo".

-----------

La Bruselaj Esperantistoj gastigis 40-o da polaj gesamideanoj kaj akceptis ilin la 19-an de novembro en Kulturcentro, Fortstrato 35a, 1060 Bruselo.

Okaze de tiu vizito el Pollando, Zuzana KAWULOK prezentis, kune kun deko da mezlernejanoj, muzikfolkloran programon.

------------

MORTSEL

En Mortsel okazas eksperimento.
Konstatinte, ke la loka periodaĵo " 't Periodiekske ", kiu aperas ĉiun duan semajnon, estas sufiĉe bone legata de la loĝantaro, ESPERANTO MORTSEL prenis anonc-abonon kaj publikigas en ĉiu numero malgrandan tekston pri Esperanto (gut-efiko).

Sekve al tiuj ripetitaj artikoletoj kunmetiĝis kursogrupo de ĉ. 10 personoj, dum aliaj petis informojn kaj kelkaj eĉ venis al la kurso "por aŭskulti".

Ĉu la eksperimento havos daŭran sukceson devos elmontriĝi. Tamen, el la kursanoj ankoraŭ forrestis neniu.
Ĉu eble la ripetitaj artikoletoj tiel efikas, ke la interesitoj al la kurso estas sufiĉe bone motivitaj por daŭrigi ĝis la fino ?

LIBROSERVO SONORILO ..

.. memorigas, ke por servi al la aĉetemuloj de libroj k.s. la libroservo estos malferma okaze de la jarfinaj festoj, je 22 kaj 23 12 1981 de 10.00 ĝis 12.15 h. kaj de 14.15 ĝis 18.00 h.

Telefonalvokoj bonvole faru inter 16.00 kaj 17.00 h.

Mendoj por pli ol BF 1.000,- rajtigas donacon ekde 26 11 1981.

--------

F L E J A - alvoko

E L   O R I E N T O ,   O K C I D E N T E N !

Ne korespondrubriko sub tiu ĉi titolo, sed jes varma alvoko al tiuj, kiuj volas instigi efektivajn kulturajn interŝanĝojn kun la Socialismaj landoj.

Kiel vi scias, homoj el "Oriento" nur malfacile povas pagi la kotizojn de niaj kongresoj, ĉar la eblecoj ŝanĝi iliajn valutojn en niajn, estas limigitaj kaj komplikaj.

Pro tio la Flandra Esperanto-Junularo proponas du formulojn, kiuj tamen ebligas interŝanĝon inter Okcidento kaj Oriento :

1. Junuloj de okcidentaj landoj, kiuj en 1983 volas ĉeesti la Internacian Junularan Kongreson en Hungario, pagu la kongreson de Leuven en 1982 por hungara junulo kaj interŝanĝe mem ricevos senpagan kongres-restadon en Hungario. Pagota tiam estas nur la vojaĝon tien, la resto estos aranĝita surloke.
2. Plenkreskuloj povas helpi laŭ la jena maniero ; anstataŭ fariĝi Patrono de la Junularkongreso en Leuven, ili pagu la kongreskotizon por junulo el Socialisma lando.

Ni esperas ke ni per tiu ĉi propono povos internaciigi niajn kongresojn sen ke transpagaj problemoj malebligu partoprenon. Pro tio ni petas vian kunhelpon kaj subtenon laŭ viaj eblecoj.

Ni ankaŭ petas vin ne entrepreni propranjn paŝojn en tiu direkto, por ne ankoraŭ kompliki aferojn.

Ĉiujn informojn pri la projekto vi povas ekhavi ĉe :

F L E J A , Arsenaalstraat 5, 2000 Antwerpen tel 031/16 05 05
aŭ en la tuja estonteco, Frankrijklei 140, A'pen, tel 031/34 34 00

------------

M O N D P A C A   E S P E R A N T I S T A   M O V A D O

Dimanĉon la 25-an de oktobro, 16 anoj de la belga sekcio de MEM manifestaciis en Bruselo por malarmado, kun propraj paneloj en ESPERANTO. Pluraj gejunuloj scivoleme petis informojn pri la lingvo, aliaj tute laŭte aplaŭdis survoje. Kvankam temis pri etika kaj superpolitika afero - laŭ mia modesta opinio multe pli grava ol lingvaj problemoj - mi ne vidis aliajn esperantistojn ! Kaj tamen la devizo de nia UEA-prezidanto estas "EKSTEREN" !

Verŝajne estis jam tro malvarme por la plej granda parto de la geesperantistoj, tiel komforte kutimiĝintaj al siaj verdaj oazoj !

Rene BUDTS, Gento.
28 X 81

------------



KORESPONDI DEZIRAS

45-jara ĥemisto interesiĝas pri amika korespondado, interŝanĝado de esperantaĵoj, artaĵoj ktp.

FRIDRICH ZÖLL
CS-07632 BORSAĈ - 368, Ĉekoslovakio.

------------

K U L T U R O

(tiun ĉi rubrikon prizorgas Fernand ROOSE, estrarano pri Kulturo)

LA FAMILIO DE GRESILLON

Ĉiuj kiuj jam ĉeestis la kulturajn semajnojn en la kastelo de Grésillon, scias kia "miraklo" tie okazas. Gesamideanoj de multaj, kiuj ajn nacioj formas baldaŭ "unu grandan rondon familian". Ĝi fariĝas vera familio en la amika esperantista mondo. Longtempe antaŭ, kaj longtempe post la monato julio, la novaj "familianoj" ankoraŭ pensas kaj parolas pri ĝi, kaj ... ili korespondas aŭ eĉ kunvenas.

Tion la Flandraj ĉeestintoj de 1981 ankaŭ faris en Antverpeno, sabaton la 7-an de novembro. Venis kune Ges-roj Smets-Vanmeulder, Beets-Van Veen, Ivo kaj Klara Durwael kun infanoj, Alberto-Wyvouw, Roose-De Kersgieter, Myriam Waeterinckx, Henny De Ketelaere kun filino.
Gaja etoso estas ĉiam akompanata de manĝaĵo kaj trinkaĵo. Pri tio zorgis abunde kaj bonegstile kaj tre varie Ivo kaj Klara (kaj, sen voĉo, mi interne kantis: "Wie zal dat betalen ?!"). Ni vidis, pli bone, admiris multajn diapozitivojn kaj fotojn. Eble kelkaj devas resti en la sekreto de tiu "elita" familio ? Kaj antaŭe ni manĝis tortojn. Kaj poste ni manĝis fromaĝojn, jes multajn fromaĝojn. Kaj ni rakontis spritaĵojn, ŝercojn.

Ivo, Klara, multan dankon, vi donis al ni agrablegan tagon.

----------

Popoloj, interkonatiĝu per Esperanto.

La antaŭmilita Flandra Ligo celis - tute en la spirito de Zamenhof - konatigi niajn landon kaj kulturon, pere de Esperanto, al aliaj popoloj kaj konatigi al la Flandroj la fremdajn kulturojn. Ĉio tio sur la bazo de neŭtrala komuna lingvo, do sen ia ajn lingva diskriminacio aŭ imperialismo. Popolo kiu tiutempe luktis por siaj rajtoj kaj kulturaj valoroj esti la Kataluna popolo. Enkonduke al tiu sciigo, Jan Van Schoor verkis jenan poemon.

K A T A L U N O J !

Katalunoj, kies lingvo
en la ora Mezepok'
el la buŝ' de trobadoroj
sonis ja en ĉiu lok' ;
kies artoj glore brilas
tra la tuta histori'.
Katalunoj, vin rigardas
tuta mond' kun simpati'.

Katalunoj, el vi multaj
en ekzilo kaj karcer'
ĝemas; sed aferon vian
ja sanktigas la sufer'.
Vian sorton kaj estonton
tenas Dio en la man'.
Katalunoj, sed ne tremu
pro despoto, pro tiran'.

Katalunoj, propra lingvo
estas de popol trezor'.
En ĝi batas ĝia vivo,
ĝia amo, ĝia kor'.
Ne vendaĉu vian lingvon
kontraŭ fremda ja idol'.
Katalunoj, post la lingvo
baldaŭ mortos la popol'.

Katalunoj, kuraĝiĝu !
Firme fidu je l'estont' :
sur malfortaj fundamentoj
krakas la malnova mond'.
Por vi ankaŭ oriente
sun' leviĝas de liber'.
Katalunoj ĉiu gento
rajtas lokon sur la ter'.

Katalunoj, patrolando
via ja ne estas ŝtat',
kiu estas nur vivebla
per perfort', persekutad'.
Luktu por libero via
kun persisto, kun obstin' ;
Katalunoj, ne forgesu
ke la mond' rigardas vin !

Tiu ĉi poemo estas certe ne majstroverko. La multaj ŝtopvortoj (ekz. : ja) ĝenas. Van Schoor verkis multe pli belajn, kiuj vere estis inspiritaj. Ni volis nur montri kiamaniere la Flandraj esperantistoj volis forĝi amikajn ligilojn inter la popoloj.



LA HISTORIA ŜERCO

(sub tiu ĉi rubriko ni proponas en ĉiu numero de INFORMILO - la formiĝanta "Flandra Esperantisto"? - iun ŝercon, sed tamen veran okazintaĵon.)

Okazis en Francujo, sub regado de Filipo II-a (kiu nomoĝis ankaŭ Aŭgust, ĉar li admiregis la fondinton de la Romia Imperio) (1180-1223). Devis esti nomataj episkopoj. Kvankam tio estis prerogativo de la Papo, en Francujo la reĝo faris tion. Ja Filipo II-a sukcesis subigi al sia diktatoremo ĉiujn, ankaŭ la ekleziulojn. Do, en la pompa "Notre Dame" li estis kunveniginta ĉiujn eminentulojn de la regno. Ĉeestis kardinaloj, episkopoj, ĉefepiskopoj, ĉiuj tre dikaj (!). Ĉeestis ankaŭ, kompreneble, la kandidatoj je elekto kiel episkopo, sed tiuj tute ne dikaj (ili ĝis tiam ne ĝuis same luksan vivon). La reĝo bone ĉirkaŭrigardis, rimarkis la "embonpoint" (ventrodikeco) de la kardinaloj, kaj interne sentis ian naŭzon pro tio. Tiam li subite turnis sin al la du plej maldikaj ekleziuloj kaj elektis ilin, dirante kaj fingrmontrante la dikulojn : "Jen, mi elektas vin. Post mallonga tempo vi estos tiel dikaj kiel tiuj (!).

FR

-----------------

KIU KONAS JENAN TEKSTON, ĜIAN ORIGINON, ĜIAN VERKINTON ?

Widats wui, confratruy, quio nui estams? Ya pulvu kaj cindru estams. En quiomt graceu principe Diu creays nuialn praun Adamun kaj donnays ad llui paradisun quiele domun. Kay ell omn fructuy trovibiluy en paradisu dirays al llui wiwir. Solel interdirays al llui unes arbores fructun. Sed Llui dirays al llui, pro quio llui ne mandduz. Ya, quiudie tui manddors ell fructu, tui mortors mortes mortun. Avdays suialn mortun de creatoru Diu, sed oblivays. Llui cedays diaboles tentun kaj manddays ell fructu kay en fructu manddays mortun. Colerays Diu kay lluin jectays ad istiunci laborosun mondun. Kay Llui fiays nestu mortes infernesquay. Kay totu lluial gentu. Quiuy estas istiuy? Nui estams, quiele powats wui widir per wuialy occuluy. Ya nec un homu povas ewitir istiun cavun. Ya nui chiuy estams irantuy ad iddi. Nuy pregiumz pro favoru siniores Diu por istiu

animu, que Llui habuz al llui indulgun kaj misericordun kaj pardonnuz al llui lluialyn culpuyn. Kaj nui pregiumz sanctan mullyerun Maria kaj beatun archangielun Michaelu kaj chiomt angielun, que illi pregiuz por llui. Kay pregiumz sanctun siniorun Petru, ad quiu donnatis potentu kay ligir kay solwir, que llui solwuz chiomt lluialyn culpuyn. Kaj nui pregiumz chiomt sanctuyn, que illi estuz al llui auxilu coram nuial sinioru Diu. Que Diu pro illialy pregiuy pardonnuz lluialyn culpuyn kay libericuz lluin de diaboles persecutuy kaj infernes turmentuy. Kaj Llui conducuz lluin ad paradisaln tranquilun kay donnuz al llui voiun ad cielun kay partun ell chiomt bonu. Kay clamutz tri foiuyn : Kyrie eleison !

Amatuy fratruy ! Pregiumz por animu isties povres homnes, quiun Sinioru ell falses mundes carceru hodie salvays, quies corpun hodie nui entericams. Que Sinioru lluin locuz cum favoru en sinun de Abrahamu, Iacobu kay Isacu, que en ultimo jugiu Llui rewiwicuz lluin por commandir lluin dextre inter Lluialy sanctuy kay electituy. Kay anch wuin. Clamate ter : Kyrie eleison !